# STARTO

N-ro 1/2007 (222)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**Esperanto-rondeto en Okříšky**

Vašek - Martin - Tomáš - Pavla - Šárka

Marie - Mirka - Anička - Tereza - Aneta - Dr. Kamila Bártlová

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 10 eŭroj (+ 3 eŭroj aerpoŝte),

**rete Starto:** malovec@volny.cz,

**rete ĈEA:**

cea.polnicky@quick.cz (sekretario)

melicharkova@quick. cz (prezidanto)

www.esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, D 500 Kč, Z 1000 Kč, Starto-abono 200 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

**Libroservo:** p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**IČO de ĈEA:** 00 44 30 34

**BANKO-KONTO de ĈEA:**
195 230 825 / 0300
Poštovní spořitelna Poděbrady

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz (reprezentace ČES, koordinace, vnitřní vztahy, metodika)

**Vicprezidanto (komitatano A de UEA)**: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinárodní vztahy, odborná aplikace esperanta, vydavatelská činnost, EU, retkomunikoj)

**Vicprezidanto:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (muzeum)

**Sekretario**: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 385 367, hirs@gm.vyskov.cz (členská základna, účetnictví)

**Komitatano:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz (kluby, konference, zápisy, čestní členové)

**Komitatano:** Miroslav Vaněk, 507 44 Libošovice 104, vanekmi@centrum.cz,
(sekce, komise)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Prezidanto: Věra Štěpánová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., stepanova.v@kr-ustecky.cz; Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef-hron@volny.cz, tel. 466 401 942;

Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@pcp.lf3.cuni.cz

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz.

**Kontrollegis:** Z. Hršel kaj la komitato

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek,
jarkacejkova@centrum.cz

# NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA

Karaj esperantistoj,

ĉi tiu estas la lasta mesaĝo, per kiu mi, kiel prezidanto de UEA, salutas vin okaze de la nova jaro. Eble venis la momento post tiom da jaroj starigi personan bilancon pri ĉi tiu tuta periodo: kion mi celis fari, kial mi celis tion, kaj kion mi atingis kaj ne atingis.

Unue mi diru sincere, ke mi opinias, ke en ĉiuj ĉi tiuj jaroj mi pli multe ricevis de UEA ol mi donis al ĝi. Same mi opinias ke dum la tuta vivo mi pli multe ricevis de Esperanto ol mi donis al ĝi. Tio verŝajne ne estas nur mia sento. Mi trovis ĝin ĉe multaj esperantistoj sed ankaŭ ĉe la plej fidelaj agantoj en aliaj idealismaj organizaĵoj, ĉu en politikaj partioj, ĉu en perditaj misiejoj en Afriko. Pro tio, kion mi ricevis de Esperanto kaj de UEA, mi dankas vin, membrojn kaj nemembrojn de UEA, kiuj legas ĉi tiujn liniojn. Mi ne forgesos viajn donacojn, kaj viaj plej belaj donacoj estas tio, kion vi faris por Esperanto.

Se temas pri Esperanto, mi havis la naivan ideon antaŭ deko da jaroj proksimume, ke unu el la problemoj de la nuna movado estas, ke ĝi ne plu estas movado. Vi scias, ke ĉiuj revolucioj en la daŭro de la tempo instituciiĝas, kaj ke la idealismaj batalantoj de la unua periodo transdonas la regadon al homoj, kiuj apartenantaj al posta generacio, ne havas la samajn idealismajn pensojn, emojn kaj agojn. Temas pri homoj, kiuj volas mastrumi efike kaj remeti en ordon la ĥaosan entuziasmon de la antaŭa periodo. Tio estas, tre verŝajne, natura leĝo, el kiu ankaŭ la Esperanto-movado ne povas elfuĝi. Se Esperanto estus la lingvo plej multe instruata en la mondo, tiam certe ne profitus el tio idealistoj kiel ni, sed tiuj samaj homoj, kiuj nuntempe profitas el la instruado de la angla. Por profiti el io, oni devas esti profitema, kaj esperantistoj ne estas tiaj.

Sed la Esperanto-movado ne venkis, kaj la problemo ne estas tiu. La problemo de la nuna movado, kiu iĝis malpli mova, estas objektiva kaj ŝuldiĝas al la ekapero en la nuna epoko de monda imperio, kiu havas sian lingvon kaj tre efike disvastigas ĝin, trovante amason da homoj, kiuj pretas akcepti ĝin kaj mem pludisvastigi ĝin. Estas klare, ke fronte al tiu problemo, kiun Zamenhof eĉ ne antaŭvidis, ni sentas nin senhelpaj, ni sentas, ke ni vane remas kontraŭflue. Kaj, kiel diras indonezia diro, eĉ krokodiloj - ĉi tie temas pri la veraj bestoj - ridas se vi provas remi kontraŭflue. Je tiu fenomeno en la pasintaj jardekoj estis plurspecaj reagoj. Kelkaj diris: ne estas nia tasko batali kontraŭ la angla. Eble kelkaj el vi konas la rakontojn pri Asteriks, loĝanto en malgranda vilaĝo de Gaŭlujo, la sola vilaĝo, kiu aŭdacas kontraŭstari la invadintan roman armeegon. Sendube la loĝantoj de aliaj vi-

laĝoj diris, ke ne estas ilia tasko, batali kontraŭ la latina -- kaj vidu la sekvojn. En tiu kazo restas al ni nur la vojo krei nian propran niĉon, nian propran neston en forlasita parto de la arbaro, kaj zorgi pri niaj aferoj.

Tion mi neniel povas akcepti. Komprenigi tion al ĉiuj esperantistoj estis unu el la linioj de mia agado. Mi, ni, estas kiel la vilaĝo de Asteriks. Ni estas malgranda grupo de idealistoj, kiuj provas enkonduki revolucian novaĵon, sed la mondo ĉirkaŭ ni ne volas aŭdi ĝin, ĉar ĝi renversas ekzistantajn ideojn kaj interesojn. La samo okazis pri sklaveco, la samo estas okazanta nun pri tre pli gravaj temoj. Oni eĉ serĉe demandas, ĉu la terglobo malaperos en la jaro 2050-a aŭ 2060-a, simple ĉar aro da homoj, kiuj taksas sian komforton pli grava ol ili taksas la pluekziston de la mondo, fajfas pri malpurigo de la medio, internaciaj konvencioj, ktp. Do, ne estas nur Esperanto, kiu estas malatentata de la regantaj fortoj en la imperio.

Ni devas agnoski la situacion de la mondo en nia lingva kampo, sed ni ne devas akcepti ĝin, se ni volas ankoraŭ havi la rajton, respekti nin mem kaj karesi niajn infanojn. Tion mi provis diri al la esperantistoj en ĉi tiu periodo, kaj mi trovis multajn aŭskultantojn favorajn je tio. Mi provis ĝisnaŭze revenigi al la idealismo de Zamenhof, kiu estis multe pli granda viziulo kaj multe pli danĝera revoluciulo ol ni nun.

Ni certe ne triumfigos Esperanton zorgante pri niaj elegioj en nia forlasita parto de la arbaro. Nur per klara montro de niaj celoj ni eventuale instigos la mondon atenti pri ni: ni volas atingi justecon en la lingva kaj kultura kampo. Eble oni rekte batalos kontraŭ ni, sed tio estos agnosko, ke ni ekzistas kaj ke niaj ideoj estas atentindaj.

Bonŝance la historio ne finiĝis. La nuna situacio ne daŭros eterne, kaj post la fino de unu batalo inter imperioj sekvas nun aliaj bataloj kaj aliaj antaŭvidoj por la estonteco. Mi kredas, ke la esperantistoj devus ree adaptiĝi al la monda situacio, kiel ili kapablis fari dum la pasinteco. Esperanto estis tre bona ponto inter homoj el malsamaj kaj inter si batalantaj landoj dum la unua mondmilito. Esperanto estis tre bona ponto inter homoj loĝantaj en malsamaj flankoj de la tiel nomata “fera kurteno” en multaj jardekoj de la pasinta jarcento. Esperanto estu ankaŭ nun bona ponto inter malsamaj kaj interbatalantaj civilizoj. Por fari tion oni devas multe pli preti aŭskulti esperantistojn el aliaj civilizoj, kaj ankaŭ aktive labori por krei ilin, kie ili ne ekzistas.

Krei esperantistojn en ĉiuj mondopartoj kaj ne nur en la tradiciaj landoj estis la dua linio de mia laboro. Certe nun UEA ne estas nur malplena mallongigo en multaj triamondaj landoj.

Mi trovis multajn favorajn aŭskultantojn pri la supre menciitaj ideoj,

sed mi ankaŭ trovis multajn indiferentajn aŭskultantojn kaj ankaŭ kelkajn kontraŭajn. Al ĉi tiuj mi diras, ke mi neniam pensis, ke nur mi posedas la veron. Ni vidu en la praktiko, kies ideoj portas pli da rezultoj, tio estas pli multaj neesperantistoj, kiuj konvinkiĝas lerni kaj uzi Esperanton, ĉar la cetero, laŭ konata libro-titolo, estas nur literaturo.

Mi devas ankoraŭ diri du aferojn. La unua temas pri la graveco de la Centra Oficejo de UEA kaj pri la supozataj (vere nur supozataj) luktoj ĉirkaŭ ĝi aŭ inter ĝi kaj la organoj de UEA. La Centra Oficejo estas la plej grava loko en la tuta komunumo. Sen ĝi ne ekzistus firma punkto al kiu rigardi. Ĝi estas nia Mekko kaj nia Vatikano, nia Jerusalemo kaj tiel plu. Dirinte tion, mi tamen diru, ke ĝi havas sian rolon kaj plenumas tion bonege, sed oni ne rajtas atendi de ĝi tion, kion ĝi ne povas fari. Se via intereso estas disvastigi Esperanton en Indonezio, en Gvatemalo aŭ en Francujo, inter la lingvo-instruistoj de Aŭstralio aŭ de Germanujo, la Centra Oficejo ne povas fari tion. Se vi volas ke Eŭropa Unio uzu Esperanton, ne pensu, ke tio okazos per translokigo de la Centra Oficejo al Bruselo. Respondecas pri la progreso de Esperanto en la mondo, pri la atingoj de la celoj de la statuto de UEA, ni mem, la aktivuloj, neniu alia. Ne havu iluzion, ke per oficistoj, vi povas anstataŭigi volontulajn agantojn. Tio estas la maljuneca malsano de nia movado, por parafrazi iun, kiun oni lastatempe tro malmulte citas. Tiukampe mi ne faris multon, sed certe UEA, inkluzive de la Centra Oficejo, eniris la retan mondon dum la lasta jardeko. Samtempe mi klopodis helpi la agantojn tra la landoj kaj tra la lokaj kluboj, ĉar ili estas la veraj produktantoj de esperantistoj, kaj ni ekzistas nur danke al ili.

La dua afero estas, ke mi havas tre bonajn memorojn pri la maniero, kiel multaj novaj esperantistoj en la ekonomie evoluinta mondo kaj multaj normalaj esperantistoj en Afriko, Azio kaj Suda Ameriko reagis je miaj tro multaj petoj pri kunlaborado aŭ tutsimple pri laborado.

La retaj lernintoj estas, ekzemple, tiuj junuloj, kiuj ekpensas, ke estus bele se ekzistus franca-esperanta vortaro, kaj ekverkas ĝin, ne konsciante pri la ekzisto de la tuta franclingva esperantistaro kaj pri ĝia historio (retaj kursoj ofte estas iom tro kaŝemaj pri la ekzistanta nereta movado).

Por doni ekzemplon pri la neeŭropanoj, mi parolu pri juna afrikano ĵus-lerninto de Esperanto, kiu havis teruran trafik-akcidenton, pro kiu li devis resti en malsanulejo, kaj lia biciklo komplete detruiĝis. Dum la restado en la malsanulejo lia ĉefa angoro estis, ke nun pro manko de biciklo li ne povos iri instrui Esperanton al lokoj malproksimaj du dekojn da kilometroj, kaj pri tio li parolis kun la homoj, kiuj demandis pri lia sano. Elirinte el la malsanulejo, kaj ricevinte la biciklon de eŭropaj

esperantistoj, li refariĝis la plej feliĉa homo en la mondo, kaj ekpedalis al siaj foraj klubetoj. Da tiaj okazoj ekzistas multaj en la plej malriĉaj landoj de la mondo. Mi bedaŭras, ke mi ne povas citi pliajn, sed ĉiuj miaj sudamerikaj, afrikaj kaj aziaj geamikoj, certe rekonos sin.

Dum ekzistos tiaj homoj, vi rajtas dormi trankvile pri la pluekzisto de Esperanto, kaj mi rajtas trankvile fini mian periodon kun granda danko al vi ĉiuj!

*Renato Corsetti*

## EŬROPA ESPERANTO-UNIO

La Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) estas asocio por antaŭenigi Esperanton en la Eŭropa Unio kun la strebo igi la Eŭropan Union lingve efika kaj sendiskriminacia. Ĝi fondiĝis jam en la jaro 1977 dum la UK en Rejkjaviko, sed ĝi devis esti plurfoje revivigita. Nun ĝi jam kelkajn jarojn laboras tre vigle, ekde la jaro 2005 ĝi estas jure registrita en Belgio, kie ĝi kreis en Bruselo Komunikadcentron, kiu i.a. celas informi eŭroparlamentanojn pri Esperanto. ĈEA estis plurajn jarojn "neoficiala membro" (do ni estis informitaj kaj iom partoprenadis la diskutojn, kvankam ni ne pagis membrokotizon). Ekde la UK en Vilno 2005 ĈEA jam estas plenrajta membro de EEU. En Vilno ankaŭ estis elektita nova estraro de EEU: Sean O Rian (prezidanto), Flory Witdoeckt (VP), Zlatko Tišljar (sekretario), Georgo Handzlik kaj Peter Baláž.

## 7-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio

okazos en Maribor, Slovenio, ekde la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2007, vidu http://esperanto-maribor.si/. La temo estas „AKVO difinas eŭropan estonton de la 21-a jarcento“ kun prelegoj pri akvo kaj ekologio, kun filmoj pri marĉoj, birdoj, riveroj, kun diskutoj pri terminologio (biologio, ekologio ktp.). Ne mankos ankaŭ prelego „Kion lernu EU el jugoslavia lingva sperto“, kaj aranĝoj Asembleo de EEU, estrarkunvenoj de EEU kaj Strategia forumo de EEU. La programon riĉigos ankaŭ koncertoj, teatraĵoj kaj ekskursoj.

Oficiala TTT-ejo de EEU estas http://www.europo.eu/, sed ĝi prizorgas ankaŭ la TTT-ejon www.lingvo.org. EEU ankaŭ eldonas Eŭropan Bultenon http://www.europo.eu/index.php?art=4 kaj ĉiun duan jaron aranĝas la Eŭropan Kongreson.

### Nova Direktoro por la CO de ELNA

La Esperanto-Ligo por Norda Ameriko havos novan direktoron por la Centra Oficejo. La estraro de ELNA aprobis la proponon, ke Vilĉjo Harris servos komence de la 15-a de februaro 2007. Li antaŭe servis kiel kasisto de ELNA kaj estro de la Komitato pri Membreco. Don Harlow, la antaŭa direktoro, konata pro sia *Esperanta literaturo en la reto,* bedaŭrinde ne plu povas servi pro malsaneco.

*Filipo DORCAS, prezidanto,*
*Esperanto-Ligo por Norda Ameriko*

## Israela poŝtmarko pri Esperanto



En la pasinta n-ro de Starto ni menciis, ke Israelo eldonis la 17-an de decembro 2006 poŝtmarkon kun portreto de Zamenhof kaj surskribo Esperanto 1887-2007 kaj porokaza stampo. Nun ni povas prezenti ĉion kune. Ankoraŭ estas aldonita flugfolio, kiu en Esperanto, la hebrea kaj la angla rakontas koncizan historion de la Esperanto-movado. Interese estas, ke la portreto de Zamenhof estas kreita el literoj de biografia teksto. La sama teksto troviĝas ankaŭ sur la porokaza koverto.

## Novaj informoj pri Ota Ginz

Rusisto Jiří Franěk eldonis 70-paĝan broŝuron **Ota Ginz - Od Petra Ginze a raketoplánu Columbia až k Šolochovovi** (Ota Ginz - De Petro Ginz kaj raketoplano Columbia ĝis Ŝoloĥov), en kiu li ĉeĥe, germane kaj angle skribas, ke ĉi tiu grava cionisto postlasis stenografiitan taglibron el la unua mondmilito, kiun kapablis deĉifri nur unu virino, sinjorino Ctiborová, kiu ĉe la deĉifrado preskaŭ blindiĝis. Ginz kiel dudekjara soldato fariĝis rusa militkaptito, laborigita en bieno de familio Ŝoloĥov, kie li konatiĝis kun 14-jara knabo Miĥail, estonta verkisto. Post 28 jaroj Ota Ginz skribis al Ŝoloĥov gratulon okaze de Nobel-premio kaj estis mirigita de lia respondo, ĉar la verkisto lin memoris. La broŝuron eldonis Asocio de iamaj malliberuloj de koncentrejo Schwarzheide. La taglibro mem estas ankoraŭ eldonota. En la libro estas nur unu mencio pri esperantisteco de Ginz, sed por ni gravas ĉefe la biografiaj novaĵoj mem.

## Nova libro de Petr Ginz

Aperos ĉeĥlingve romano *Návštěva z pravěku* (Vizito el praepoko) de la juda knabo-esperantisto mortigita de faŝistoj en 1945, filo de Ota Ginz. La romanon preparas Societo Franz Kafka en Prago.

# Ulrika



Dum la 18-a Internacia Kultura Festivalo en Ústí nad Labem (vidu p. 26) estis prezentita ankaŭ loka poetino **Alena Melicharová** kaj ŝia nova longa poemo (kvindeko da kvarversaj strofoj) *Ulrika*, pri junulino Ulrika von Levetzow, kiu enamiĝis al maljuna Goethe kaj neniam edziniĝis pro amo al li.

La broŝureto en pli modesta formo aperis nun kun tradukoj al Esperanto (fare de Jaroslav Krolupper), al la germana kaj soraba lingvoj (ambaŭ tradukoj de Michael Wolf).

# LA AVANTAĜOJ DE URBĜEMELIĜO PER ESPERANTO

Eble ne ĉiuj scias, ke en marto 2005 la urbestroj de Herzberg (germana urbeto apud Hanovro) kaj de Góra (Pollando) renkontiĝis kaj - surbaze de decido de la respektivaj urbaj konsilantaroj - deklaris la du urbojn ĝemeligitaj kaj fiksis ke la reciprokaj oficialaj rilatoj okazos per Esperanto. Al tiu ĉi senprecedenca – iasence eĉ sensacia- rezulto kontribuis la agado de la Esperanto-societo en Herzberg.

Ne temas nur pri surpapera decido, ĉar ekde la menciita dato la kunlaboro inter Herzberg kaj Góra akiris tre konkretajn formojn. Ekzemple: en somero 2005 la E-societo en Herzberg du semajnojn gastigis kaj trejnis sep instruistinojn el Góra, kiuj poste vastaskale instruis la internacian lingvon en sia urbo. Plej originale estis samjare la dusemajna internacia Arbara Lernejo apud Herzberg, dum kiu aranĝo multaj infanoj el ambaŭ landoj plibonigis sian Esperantan lingvoscion. La sama iniciativo ripetiĝos en 2007 kun partopreno de trideko da gelernantoj kaj geinstruistoj.

Alia aspekto de la ĝemeliĝo estas multnombraj kursoj de Esperanto okazantaj en ambaŭ urboj.

Ĉu ne temas pri modelo de internacia kunlaboro, kiun oni devus imiti?

Pliaj informoj: http://ic-herzberg.de

*

# LA MOVADO EN HISTORIA PERSPEKTIVO

La projektojn de esperantaj Komunumoj, la fortojn kaj malfortojn de la Esperanto-Movado, la Universalajn Kongresojn inter soleno kaj kaoso, la 100-jaran datrevenon de la 1-a Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer kaj la demandojn de la nuntempa junulara Esperanto-movado pritraktis la 32-a Studsesio okazinta ĉe la Interkultura Centro en Herzberg am Harz (Germanio). Dum la studsesia semajnfino, de la 2-a ĝis la 4-a de februaro 2007, okazis ankaŭ viglaj debatoj pri la Esperanta stilistiko. En la kadro de la programo prelegis Peter Zilvar kaj Dirk Bindmann (Germanio), Veronika Acsádi (Hungario) kaj Gian Carlo Fighiera (Italio).

**Venontaj studsesioj** pri leksikografio, interlingvistiko kaj instrumetodoj:

Prof-ro H. D. Krause kaj d-rino Sabine Fiedler prelegos pri leksikografio, frazeologio kaj interlingvistiko dum la posta 33-a Studsesio (11-13 majo 2007).

La sekva 34-a Studsesio okupiĝos ĉefe pri metodologio kaj instrumetodoj, donante praktikan helpon al tiuj, kiuj ŝatus lerni de spertuloj. Gvidantoj: Zsofia Korody, kaj nome de edukado.net: Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge.

Pliaj informoj: http://ic-herzberg.de

# Turisma kaj lingva seminario en Bahratal

**(orienta saksa Ercmontaro)**

de la 8-a ĝis la 11-a de junio 2006

Organizanto: Esperanto-Asocio Saksa Svisio r. a.

Kontaktoj: Norbert Karbe, Dr.-Otto-Nuschke-Str. 12, 01796 Pirna

nokosaksio@tiscali.de, Tel. 03501 773232

Dr. Frank Nitzsche, Dresdner Str. 115, 01326 Dresden. Tel. 0351 4109933.

frank.nicxe@t-online.de,

Bahratal situas apud la ĉeĥa limurbeto Petrovice meze inter Pirna kaj Ústí kaj estas rapidege atingebla tra la tute nova aŭtostrado A17 (en Ĉeĥio D8) elirejo Bad Gottleuba (kuracloko en arbaroriĉa mezmontara regiono). Atentu ke iomete pli norde situas **alia nove kunmetita urbeto** Bahratal, kiu havas propran elirejon el la aŭtostrado A17.

El Pirna (busa stacidomo kajo 3/ 50 m sude de la trajna stacidomo - trairu la tunelon sub la trajnlinio al la rivera ponto) 3 buslinioj (216, 218, 219) dum iomete malpli ol 1 horo transportas vin al la haltejo "Bahratal Dorfplatz" (iam Hellendorf; poste ili atingas la limon). Preskaŭ ĉiuhore iu el la busoj forveturas (www.vvo-online.de).

El la ĉeĥa Libouchec (tie ankaŭ troviĝas trajnhaltejo) veturas 2 ĉeĥaj buslinioj 590050, 590060 www.idos.cz al Petrovice ĝis la limo (distanco de tie ĉirkaŭ 2 km)

La seminariejo troviĝas en iama uzina feriejo "Buschbachbaude" en iama vilaĝo Kleppisch (1 km al la haltejo "Dorfplatz"). Apude ni mendis kelkajn modestajn finnstilajn kabanojn por po 5 personoj kun restadĉambro + fridujo + necesejo + duŝejo en la teretaĝo kaj 2 dormĉambroj (2 resp. 3 personoj) en la supra etaĝo. Eblas ankaŭ tranokti en la gastejo "Zur Linde" en 2-kilometra distanco en la urbeta parto Markersbach (bonvolu mem mendi: www.gasthaus-zur-linde-bahratal.de, Talstr. 30, 01816 Bahratal, Tel. 035023- 62841). En tiu regiono vi povas migri tra arbaroj al montoj altaj ĝis 650 m super la marnivelo kun bela elrigardo al la montoj de la Bohemia Mezmontaro kaj al la sabloŝtonaj montoj de la saksa Svisio kaj vi povos admiri la imponajn konstruaĵojn (pontojn kaj tunelojn) de la nova aŭtostrado A17/D8. Ne forgesu vian pasporton!

La nombro de la sidlokoj en la prelegejo estas limigita, tial baldaŭ aliĝu. Eksterlandanoj pagu surloke.

# BEF-4 ne okazos

La 10an de februaro en Kaliningrado okazis Konferenco de Kaliningrada Regiona Esperantista Unuiĝo (KREU). La Konferenco akceptis la agadraporton kaj la financan raporton de la Komitato de KREU kaj elektis ties novajn gvidorganojn. Interalie, la Konferenco decidis nuligi la 4-an Baltan Esperanto-Forumon (kiu devus okazi en Kaliningrado en julio 2007) pro sanproblemoj kaj/aŭ granda profesia premo de la ĉefaj organizantoj.

*laŭ ret-info*

# TRA ESPERANTUJO

**Retpaĝo de Societo Kalocsay**

Ni komencu la novan jaron per bona novaĵo: ankaŭ la "Societo Kalocsay" havas jam proprajn retpaĝojn!

La "Internacia Amika Societo Kalocsay" kiel memstara jura persono estis fondita en la jaro 1991 kun la gvido de s-ino Csiszár Ada. Ĝi okupiĝas unuavice per la flegado de Kalocsay-vivoverko, kaj hodiaŭ jam havas pli ol 40 membrojn. Adreso de la retejo: http://www.esperanto.hu/kalocsay/

## Esperanto je la servo de la entreprenoj

La firmao "Mondo", kiu helpas en la konstruado de alternativaj domoj, uzado de sunenergio, purigo de uzita akvo, ktp, havas retejon http://www.mondo.be en pluraj lingvoj, i.a. en Esperanto. http://www.mondo.be/Esperanto/index.html

Okazo prezentiĝas, ke Esperanto-parolantoj esprimu sian kontenton, aprezon kaj aprobon en Esperanto en ties gastlibro.

*Germanin Pirlot*

## Nova sekretariino en Litovio

Ekde komenco de 2007 en oficejo de Litova Esperanto-Asocio en Kaunas ne plu oficas sekretariino Aida Cizikaite. Lige kun tio la 2-an de novembro 2006 estis anoncita konkurso por okupi tiun postenon. La nova sekretario estas Jurate Pupstaite.

*Litova Esperanto-Asocio*

# Esperanto-libroj en 2006

En la pasinta jaro surmerkatiĝis 204 libroj en/pri Esperanto sur entute 30 mil paĝoj. Ilin produktis 114 eldonintoj. Plej multe eldonis "Libro-Mondo" (Pollando). Pliaj statistikaĵoj estas en la tradicia revuo de Aleksander Korĵenkov "Eldonado en Esperantujo: jaro 2006". Ĝi aperis en la februara kajero de "La Ondo de Esperanto" kaj jam estas legebla en la retejo de "La Ondo" ĉe: http://www.esperanto.org/Ondo/ en la rubriko "Novaĵoj".

## Nova arkivejo de Radio Vatikana

Nova arkivejo de Radio Vatikana, kun kelkcent elsendoj en Esperanto estas je via dispono ĉe http://www.radio-vatikana-esperanto.org/index.php

Maldekstre aperas resumo de la tri lastaj elsendoj. Dekstre kompleta listo de la arkivitaj programoj kun ebleco serĉi

- laŭ dato (monato) kaj rubriko (evangelio, internaciaj informoj, leterkesto...)
- laŭ vortoj: ekz. tajpu 'Bartolomeo' en la fako 'serĉu vorton' kaj klaku sur 'EK' por listigi 8 elsendojn kie temas pri la ortodoksa ekumena patriarko. Klako sur la "Aŭskultu/Elŝutu" lanĉas simple la mp3 arkivon, kiu estos legata de via TTT-krozilo.

**Rimarko:** se la programo estas ankoraŭ havebla en la oficiala retejo de Radio Vatikana, ĝi estas elŝutita de tie, tiel ke la statistiko de la stacio registru vizitojn de esperantistoj.

*Bruno Masala*
*amb@osiek.or*

## THORSEN-APOGO AL SEP BIBLIOTEKOJ

Sep bibliotekoj ricevis subvenciojn de la fondaĵo Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen je la suma valoro de 1250 eŭroj. La subvencioj estas donataj kiel libroj laŭ la dezirlistoj, kiujn la bibliotekoj sendis kun siaj petoj. Po 250-eŭran subvencion ricevis la *Brazila Sekcio de ILEI, Interkultura Centro Herzberg* (Germanio), *Pakistana E-Asocio* kaj *La Ondo de Esperanto* (Rusio). *E-Biblioteko de Kuzerano kaj Pireneoj* (Francio) povis pliriĉigi sian kolekton por 100 eŭroj. La bibliotekoj de la *Kultura Domo de Esperanto*, konata kiel Kastelo Greziljono (Francio), kaj *Vicenza E-Centro* (Italio) ricevis po 75 eŭrojn.

## USUI HIROYUKI REĜISOROS LA KONGRESAN TEMON

La juna japana esperantologo Usui Hiroyuki estis elektita de la Estraro de UEA por reĝisori la traktadon de la kongresa temo de la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo. "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto". Interesan enkondukon al la temo s-ro Usui faris jam en la novembra Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA.

### LIBROSERVO DE UEA: PLIALTIGO DE MINIMUMAJ SENDOKOSTOJ UNUAFOJE POST 1981

Ekde la 1-a de januaro 2007 la minimumaj sendokostoj estos 4 eŭroj. Sen ŝanĝo validos plu la baza regulo, laŭ kiu la Libroservo fakturas por ekspedo 10% de la mendosumo. Sekve la plialtigo de la minimuma krompago koncernos nur mendojn sub 40 eŭroj.

## Beletra Almanako

en aŭtuno 2007 estos lanĉita nova literatura periodaĵo, kiu komence aperos unufoje jare (eble dufoje) kaj nomiĝos "Beletra Almanako" (BA). Ĝin redaktas Jorge Camacho (ĉefredaktoro), Probal Daŝgupto kaj István Ertl (redaktoroj). Ĝin eldonas Ulrich Becker (Mondial, Novjorko). Laŭ interkonsento kun UEA, ankaŭ la verkoj premiitaj en la Belartaj Konkursoj aperos en BA. Pli detale vidu

ĉe: http://www.librejo.com/beletra-almanako/index.html

### ORATORA KONKURSO EN JOKOHAMO

En la 92-a UK en Jokohamo denove okazos Oratora Konkurso por gejunuloj ĝis 30-jaraj, kiuj povos elekti inter kvar temoj: - Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto - Kiel la reto ŝanĝas la Esperanto-movadon? - Ĉu ni lernas el la pasinteco? - Sciencfikcio - ĉu fantazio aŭ aŭguro?

## Novaj materialoj en STEB

Al la Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko ĉe: http://www.eventoj.hu estis aldonitaj novaj verkoj: * *Mi komprenas fine la radion!* * *Enkonduko en la teorian biologion* * *La araneoj* * *Balanciĝo de elektra reta frekvenco* * *Liverkondiĉoj kaj damaĝoj de varoj ĉe fervoja vartrafiko* * *Nova rigardo al la nomoj de la kemiaj elementoj en Esperanto* * *Sistemo Internacia de mezur-unuoj* * kaj aliaj.

*E-klubo „LA PONTO“ sincere invitas vin pasigi kune agrablan tagon dum la*

## II-a SABLA PRINTEMPO (PÍSECKÉ JARO)

okazonta sabate la 14-an de aprilo 2007 en Písek

Kio atendas vin ĉi-jare?

**10.30** renkontiĝo antaŭ la Regiona Muzeo (eniro el la ĉefa Granda placo)
- sekve komuna trarigardo de la urbocentro (laŭ alia itinero ol pasintjare), riĉigita per malgranda urba serĉludo,
- vizito de unika, romantike situanta historia Urba elektrejo

**12.30-13.30** tagmanĝo en salono de la populara restoracio „U Reinerů“

**13.30-15.00** kleriga kaj kultura E-programo samloke

**15.00** - alternativaj promenoj al la Urba Insulo aŭ al galerio Portyč

Partoprenkotizo 150,- Kč (pensiuloj kaj studentoj ĝuas 30,- Kč rabaton) inkluzivas programon, enirpagojn, kompletan tagmanĝon (sen trinkaĵoj) kaj ricevotajn informmaterialojn.

Bonvolu sendi ĝin ĝis 5.4. aŭ al konto ĉe Česká spořitelna: 0130625033/0800 (bv. klare indiki vian nomon!) aŭ per poŝtpagilo al: V. a P. Dvořákovi, Gregorova 2563, 397 01 Písek.

Ambaŭkaze vegetaranoj aldonu literon „V“ en mesaĝo por ricevonto.

Se vi pagas samtempe por kelkaj personoj, ne forgesu skribi ĉies nomojn.

Bonvolu kunporti vian pagokvitancon. Surlokaj aliĝintoj krompagas 50,-.

Por dezirantoj el malproksimo ni povas certigi tranokton en ekipitaj apartamentoj en la urbocentro (500,- Kč por 2 noktoj kaj 1 persono).

Informiĝu ĝis 30. 3. 2007 ĉe vl.dv@centrum.cz (uzeblas ankaŭ kiel Skype adreso), aŭ telefone ĉe 774 999 091. 50%-a antaŭpago estas bezonata.

Ni elkore ĝojatendas vian alvenon!

*Jako příprava na některé tematické okruhy lančovského semináře (str. 23) je koncipován pracovní seminář*

## „ESPERANTO EN LA RETO“

který proběhne v Písku 13.-15.4.2007 paralelně se setkáním Sabla Printempo.

Je určen pro 3 okruhy zájemců:

1. pro ty, kteří rozumějí problematice tvorby webových stránek a chtěli by se podílet na vytvoření vhodné šablony pro webové stránky klubů a sekcí ČES
2. pro ty, kteří sice programování nerozumějí, ale ovládají základy práce s počítačem a rádi by pro svůj klub či sekci takovou stránku založili a spravovali (doplňovali aktuálními informacemi) a chtěli by se naučit jak to provést.
3. pro ty, kteří mají zájem se podílet na překládání turistických materiálů o městech a kulturních památkách do esperanta (s možností klasického uplatnění i využití na webu) - a to jak pro jazykově zkušenější, tak i pro méně zkušené (pokud možno schopné zpracovat text na počítači v MS WORDu)

Na semináři bude utvořena i internetová diskusní pracovní skupina, do níž se budou moci zapojit i zájemci, kteří se semináře nezúčastnili. O ní vás budeme doufejme informovat v příštím čísle Starta.

Pracovní program bude probíhat ve čtyřech tříhodinových blocích (v pátek večer společný úvod do problematiky,

v sobotu dopoledne a odpoledne práce ve skupinách, v neděli dopoledne společná prezentace výsledků práce a diskuse).V sobotu mezi 12.00 a 15.30 je plánována pauza na oběd, kulturní program a procházku po městě (společně s účastníky akce Sabla printempo).

Poplatek 220,- zahrnuje účast na programu a sobotní oběd. Ostatní jídla si účastníci zajišťují sami. Pro zájemce můžeme rezervovat ubytování ve vybavených apartmánech v centru města či ve 4lůžkových pokojích v hotelu Buly (500,- za 2 noci a osobu).
Zájemce prosím o vyžádání si přihlášky (nejpozději do 28.3.) na mailové adrese pavladvorakova@tiscali.cz.

Platební podmínky a kontaktní spojení jsou stejná jako u akce Sabla Printempo (viz samostatný článek v tomto čísle). Věřím, že se nám na této akci podaří vytvořit základy dobrého pracovního týmu, schopného realizovat konkrétní projekty na podporu esperanta v nových podmínkách nového tisíciletí.

*PhDr. Pavla Dvořáková*
*koordinátorka akce*

*La Akademio de Esperanto ĵus voĉdone aprobis la jenan raporton de la Sekcio pri prononcado (33 akademianoj voĉdonis jese, 5 nee kaj 1 sindetene).*

## Pri apartaj teknikaj bezonoj rilate al niaj alfabeto kaj ortografio

La Akademio de Esperanto konfirmas sian pozicion, jam esprimitan en 1982, ke la ortografio de Esperanto, kiel ĝi estas prezentita en la Fundamento de Esperanto, konformas perfekte al la karaktero de la lingvo, kaj ke neniu ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda.

Nur kiam la cirkonstancoj ne permesas uzi la ĝustajn supersignojn, kaj kiam pro apartaj bezonoj la Fundamenta anstataŭa skribsistemo (ch, gh, hh, jh, sh, u) ne estas oportuna, oni povas anstataŭigi la supersignajn literojn per aliaj signoj aŭ signokombinoj. Tian anstataŭigon, kiam ĝi estas nura teknika rimedo, ne celanta reformon de la ortografio de Esperanto, kaj kiam ĝi neniel kaŭzas konfuzon, oni ne rigardu kiel kontraŭ-Fundamentan.

Ekzistas ankaŭ aliaj cirkonstancoj, kiam nia lingvo estas prezentata alimaniere ol per la normala skribo, ekz. en stenografio, morse, brajle, per fonetika transskribo k.s., kaj kiam teksto Esperanta estas konservata aŭ transsendata elektronike en cifereca formo laŭ diversaj kodsistemoj, kaj ankoraŭ aliaj similaj okazoj. Ankaŭ tiajn manierojn skribi, transskribi aŭ prezenti nian lingvon oni ne rigardu kiel kontraŭ-Fundamentajn.

*Geraldo Mattos*

*Prezidanto de la Akademio de Esperanto*

## Nezaplacené členské příspěvky

Vážení přátelé,

blíží se konec února a mnozí z vás dosud nesplnili svou základní členskou povinnost - zaplatit členský příspěvek na tento rok. Abyste snadno zjistili, jak je to s vaší platbou, bude nyní nově uváděn na adresním štítku za členským číslem u nezaplativších členů následující zamračený ksichtík: „:-(“. (Spatříte jej po naklonění hlavy doleva nebo po otočení Starta doprava.) Po zaplacení jej na adresním štítku příštího Starta již neuvidíte. Může se však stát, že vaše platba sice byla poukázána, ale přesto se na vás obličejík na adresním štítku mračí. Čím to může být? Příčin může být hned několik.

Nejčastější je případ, kdy není u platby uveden žádný variabilní symbol, případně je symbol neúplný či chybný. Proto si před platbou laskavě pročtěte odstavec na předposlední stránce (každého) Starta. Pro jistotu zde zopakuji to nejdůležitější, co se týká platby členských příspěvků. Na každém adresním štítku Starta je uvedena členská kategorie podle výše poslední známé platby a **vlastní členské číslo** (+ nově případný zamračený obličejík). Pro každou platbu svazu je nutné ve variabilním symbolu uvést členské číslo toho, za koho je platba uskutečněna. To je však jen první část variabilního symbolu. Bezprostředně za členské číslo uvádějte **důvod platby**. Pro členství v ČES to je 06940. Takže člen, který nalezne na adresním štítku například „B 1098:-(“ by měl na účet svazu (viz druhá stránka každého Starta) zaslat členský příspěvek ve výši minimálně 200Kč a uvést variabilní symbol 109806940.

Další příčinou, díky které není vaše platba známá, může být situace, kdy jste členské příspěvky vybrali v místním kroužku, tyto příspěvky nebyly poukázány nebo byly sice poukázány na účet svazu, ale nebyl odeslán jmenný seznam členovi výboru ČES, který vede evidenci členů.

Poslední příčinou může být přehlédnutí, či lidská chyba při vedení členské evidence, případně chybná improvizace při přiřazování plateb s nekompletním variabilním symbolem, kdy se však podle nějakých indicií dá s velkou pravděpodobností plátce stanovit - někdy tedy i chybně.

V poslední době došly na účet svazu následující platby, které jsem si netroufl nebo opravdu nemohl při nejlepší vůli určit:

**Neadresné došlé platby**

červen 2006 - 100 Kč,
15.9.06 - 100 Kč,
15.9.06 - 200 Kč,
18.9.06 - 200 Kč,
20.9.06 - 200 Kč,
9.10.06 - 200 Kč,
21.12.06 - 200 Kč, VS 6940,
27.12.06 - 1.700 Kč z EK Plzeň bez seznamu,
28.12.06 - 200 Kč, VS 93370753,
2.1.07 - 500 Kč, VS 6940,
25.1.07 - 1.220 Kč
17.1.07 - 50 Kč, VS 0.
22.2.07 - 200 Kč, VS 0

Pokud se někdo poznáte v uvedených platbách, laskavě mě kontaktujte, nejlépe e-mailem nebo večer telefonicky.

*Vratislav Hirš*

# Libroservo

Položky označené písmenem "P" jsou určené k prodeji, ale také si je mohou objednat esperantské kluby jako bezplatný propagační materiál. Ke všem zásilkám je účtováno poštovné, které se odvíjí od hmotnosti zásilky. Objednanou literaturu neposíláme na dobírku. Za objednané zboží se platí přiloženou složenkou. Nadále zůstávají v platnosti slevy:

při nákupu min. 200,-Kč............ 10%
min. 500,-Kč............ 15%
min.1000,-Kč........... 20%

Slevy neplatí při prodeji do zahraničí a při stánkovém prodeji během sjezdů, konferencí a ostatních setkáních esperantistů. Nabízené tituly a materiály je možno objednat e-mailem na adrese:

anjivy@seznam.cz

nebo na adrese: Anna + Jiří Vyšinkovi
Libroservo ČES
Kollárova 131
696 42 Vracov

| Kód | | Název | Cena |
|---|---|---|---|
| 2 | P | Saluton el kongresurbo | 2 |
| 3 | P | Saluton 81-a UK | 3 |
| 1004 | | Esperantem za 3 měsíce | 147 |
| 1006 | P | Vondroušek:Historie a spisov. | 10 |
| 1007 | P | Vondroušek:Historio kaj biog. | 10 |
| 1008 | | Malovec:Gramatiko de E-o | 130 |
| 1009 | P | Kilian:LMR | 10 |
| 1010 | | Kamarýt:Historio de E en ĈS | 20 |
| 1016 | | Melichárková: E pro děti 2 | 126 |
| 1017 | | Melichárková: E pro děti 1 | 98 |
| 1027 | | Feidler-Rak.:Ilustrita frazeolo | 140 |
| 1028 | | Baza Ĉeĥa konverzacio | 39 |
| 1029 | P | Vondroušek:Historio kaj lit. | 10 |
| 2002 | P | Kilian:Č-E a E-č slovník | 10 |
| 2003 | P | Hromada: E-č a č-E kapes. sl. | 20 |
| 2004 | | Filipové:Velký č-E/E-č slov. | 20 |
| 2005 | | Malovec, Kraft: Slovník E-č | 129 |
| 2006 | | Kraft: Slovník Č-E | 188 |
| 2007 | P | Rybář: Hidraŭlaj meĥanismoj | 10 |
| 2008 | P | Traxler: Č-E právnický slov. | 25 |
| 2009 | P | Traxler: E-č právnický slov. | 25 |
| 2010 | | Chrdlová, Malovec: Konver. | 39 |
| 3004 | P | Kožík:Lumo en tenebroj | 26 |
| 3007 | | Echtner: Sep tradukoj | 13 |
| 3013 | P | Abunde kaj redunde | 4 |
| 3020 | | Kurisu:Co mi dala čes.lit. | 30 |
| 3022 | | Knaboj de Kastora rivero | 50 |
| 3024 | | Tvarožek: Ŝercoj 1 | 12 |
| 3025 | | Tvarožek: Ŝercoj 2 | 12 |
| 3029 | | Ludíková: Pošli to dál | 120 |
| 3030 | | Váňa:Rakontoj ne nur ŝercaj | 146 |
| 3031 | | Kraft: Heroo de amo | 190 |
| 3043 | | Ludíková: Pošli to dál 2 | 150 |
| 4001 | P | Urbanová: El subaj fontoj | 16 |
| 4003 | P | Kvarfolio | 4 |
| 4004 | | Sileziaj kantoj | 4 |
| 4005 | | Kořínek:Elekto el la origin. | 5 |
| 4007 | | Majo | 62 |
| 4009 | | Ludíková: Ekaŭdi la animon | 96 |
| 4010 | | Gazda: Frenezetaĵoj | 10 |
| 4012 | | Uslyšet duši 1+10/vícejaz./ | 96 |
| 4013 | | Uslyšet duši/1+10/ | 96 |
| 4017 | | Urbanová:Rapide pasis temp' | 98 |
| 5004 | | Chrdlová:Kanto por ĝojo | 86 |
| 6002 | P | Kolekto el AEST 1989 | 30 |
| 6003 | P | Werner:Terminologia kurso | 20 |
| 6004 | | Tůma: Pri la varmo | 9 |
| 6005 | P | Seminario pri Komenio | 10 |
| 6010 | | Jak úspěšně jednat s Japonci | 30 |
| 6011 | | La nova realismo III | 150 |
| 6012 | | La nova realismo II | 63 |
| 6017 | P | KAEST 98, resumoj | 15 |
| 6022 | P | KAEST 98 | 150 |
| 6024 | P | Fakaj aplikoj de E | 150 |
| 6026 | | Freud:Kompendio de psikoan. | 146 |
| 6043 | P | KAEST 2004 | 120 |
| 7001 | P | Poŝatlaso Praha | 15 |
| 8001 | | Team - kasedo | 58 |
| 8002 | P | Famaj kantoj por belaj horoj | 57 |
| 8003 | P | Kantoj de l´popolo - kasedo | 57 |
| 8004 | P | Kantoj de l´popolo - KD | 115 |
| 9001 | P | E hvězda v bílém poli | 5 |
| 9002 | P | E hvězda v kruh.výseči | 5 |
| 9003 | P | E-zdravotníci | 5 |
| 9004 | P | Odznak ČES | 5 |

# PŘÍSPĚVKOVÝ ŘÁD ČES

platný od 1.dubna 2007

1. Povinností každého řádného a přispívajícího člena ČES je platit roční členské příspěvky podle jedné z následujících kategorií:

**- kategorie A** (řádný člen)

Roční příspěvek: minimálně **300,- Kč**

Kategorie: osoby ekonomicky aktivní

Členské výhody: bezplatný odběr svazového časopisu Starto, využívat nabízených služeb ČES - se slevami, právo volit a být volen (po dosažení 18 let věku) do orgánů ČES a další dle Stanov ČES

**- kategorie B** (řádný člen)

Roční příspěvek: minimálně **200,- Kč**

Kategorie: osoby ekonomicky neaktivní – studenti, důchodci, invalidní důchodci, rodič na rodičovské dovolené

Členské výhody: jako členové v kategorii A

**- kategorie C** (řádný člen)

Roční příspěvek: minimálně **100,- Kč**

Kategorie: rodinní příslušníci člena v kategorii A, B nebo F, mohou uplatňovat osoby nevidomé

Členské výhody: jako členové v kategorii A vyjma odběru časopisu Starto

**- kategorie P** (přispívající členství / příznivci esperanta)

Roční příspěvek: minimálně **150,- Kč**

Kategorie: příznivci bez závazku učit se esperantu

Členské výhody: právo využívat nabízených služeb ČES se slevami

**- kategorie F** (doživotní řádný člen)

Roční příspěvek: **dobrovolný**

Kategorie: členové ČES, kteří v minulosti jednorázově výrazně podpořili činnost ČES; od roku 2004 se nelze stát novým doživotním členem

Členské výhody: jako členové v kategorii A

2. Při vstupu nového člena do ČES se kromě členského příspěvku vybírá zápisné ve výši 20,- Kč.

3. Pokud klub nebo kroužek ČES poukáže platbu členských příspěvků hromadně a zašle seznam platících členů členovi výboru ČES pověřenému vedením členské evidence do 31. prosince předchozího roku, získá slevu ve výši 10%, která bude připsána na subkonto klubu nebo kroužku v účetnictví ČES.

4. Členové ČES mohou v běžném roce podpořit činnost ČES poskytnutím peněžitého daru. Na požádání vystaví účetní ČES doklad o přijetí daru pro daňové účely.

Členské příspěvky a peněžité dary jsou použity především na přípravu, tisk a distribuci svazového časopisu Starto, administrativní a režijní výdaje výboru ČES a nákup knih do Libroserva.

## DLT - faktoj pri finita projekto

Raporton de Klaus Schubert pri la fama traduk-projekto pere de Esperanto vi povas legi en Scienca kaj Teknika Biblioteko, sekcio: ceteraj materialoj

http://www.eventoj.hu/steb/

## Výsledek hospodaření ČES za rok 2006 a rozpočet na rok 2007

| | | Skutečnost 2006 | | Rozpočet 2007 | |
|---|---|---|---|---|---|
| ***stručný popis*** | ***řádek*** | ***příjmy*** | ***výdaje*** | ***příjmy*** | ***výdaje*** |
| členské příspěvky na běžný rok | 1 | 38620 | 500 | 46800 | |
| členské příspěvky na následující rok | 2 | 32600 | 4475 | 28000 | |
| mim. příspěvky členů, vč. konf. | 3 | 41226 | | 12500 | |
| dary | 4 | 3000 | | 12000 | |
| předplatné Starto bez členství | 5 | 700 | | 800 | |
| provize za předplatné časopisů . | 6 | 1555 | | | |
| písemné kurzy | 7 | 3600 | | 3000 | 2000 |
| prodej knih a ost. mat. z Libroserva | 8 | 3254 | | 4500 | 200 |
| nákup knih do Libroserva | 9 | | 4388 | | 3000 |
| poštovné a balné Libroservo | 10 | 413 | 331 | | |
| úroky bankovní | 11 | 262 | | 300 | |
| konference/sjezd ČES | 12 | 76859 | 61311 | 10000 | |
| UEA - provize ind. členství | 13 | 3534 | | 2800 | |
| UEA - kolektivní členství | 14 | | 3464 | | 4000 |
| UEA - náklady hl. delegátky | 15 | | 2335 | | 2000 |
| sekce, kroužky, fondy | 16 | 87947 | 74935 | 4800 | 19000 |
| sam. sekce, kluby, a soukr. osoby, UEA | 17 | 88414 | 128151 | | |
| kurzové rozdíly | 18 | | 256 | | |
| tisk Starto (vč. platby č. 4/05 v r. 06) | 19 | | 36067 | | 28000 |
| poštovné a balné Starto | 20 | | 27020 | | 27000 |
| tvorba a distribuce Starto | 21 | | 4800 | | 4800 |
| jízdné a stravné | 22 | | 6414 | | 12000 |
| poštovné | 23 | | 740 | | 2000 |
| telefon a internet | 24 | 2700 | 6957 | | 4200 |
| poplatky bankovní | 25 | | 2313 | | 2300 |
| vedení účetnictví | 26 | | 6000 | | |
| nájemné za sklad | 27 | | 6658 | | |
| nákup služeb - kopírování apod. | 28 | | | | 1000 |
| režijní materiál - kancel. potřeby | 29 | | 427 | | 1000 |
| poplatek muzeu v České Třebové | 30 | | | | 2000 |
| dary a reprezentace | 31 | | | | 1000 |
| změna stavu záv. a pohled. | 32 | 5989 | 7434 | | |
| rozdíl na konci a na počátku (zisk) | 33 | | **5695** | | **10000** |
| kontrolní součet | 34 | 390 673 | 390 673 | 125 500 | 125 500 |

**Poznámka:**

Případné dotazy k tabulce rád zodpoví pokladník ČES**:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 385 367, e-mail: hirs@gm.vyskov.cz.

## Konference ČES 2007

se uskuteční v Poličce ve dnech 21.-23. 9. 2007. Přihláška bude v příštím čísle.



*Konferencejo en Polička*

**Návrhy doprovodných programů.** Protože se na konferenci v Českých Budějovicích 2006 osvědčil model doprovodných programů, máte možnost zaslat požadavky na zařazení svých příspěvků do letošního doprovodného programu. K dispozici budou opět dvě místnosti.

Požadavek musí obsahovat tyto informace:

- název příspěvku
- jméno přednášejícího
- předpokládaná délka
- plánovaný den prezentace (pátek, sobota, neděle)
- plánovaný začátek prezentace

Předpokládaná délka, plánovaný den prezentace a plánovaný začátek prezentace si vyhrazujeme po konzultaci pozměnit dle potřeby. Vaše požadavky očekáváme do 15. dubna 2007 na vanekmi@centrum.cz nebo Miroslav Vaněk, 507 44 Libošovice 104.

*Miroslav Vaněk*

### Oficiala lanĉo de Amikumu.com!

La 18-an de februaro oni lanĉis ĉe http://www.amikumu.com novan retaron pro la Semajno de Internacia Amikeco (19-26 feb). Per Amikumu.com, vi povas facile amikumi kun aliaj esperantistoj tra la tuta mondo. Vi povas trovi proksimajn amikojn, homojn kun samaj interesoj kaj ankaŭ libere diskuti en niaj novaj babilejo kaj forumo.

En Amikumu ĉiu povas krei profilon, en kiu li aŭ ŝi prezentas sin. Vi povas aldoni, pri kio vi interesiĝas kaj alŝuti fotojn. Poste eblas en Amikumu serĉi esperantistojn, ekzemple laŭ interesoj, kaj aldoni certan personon - amikon - al via konto.

Verŝajne la plej interesa opcio en Amikumu estas la ebleco vidi ĉiujn uzantojn sur Google Maps. Tiel oni povas vojaĝi ĉirkaŭ la mondo vidante, kie kiu loĝas. Eĉ estas aparta paĝo kiu montras al vi liston de uzantoj ordigitaj laŭ proksimeco al vi, do vi povas malkovri nekonatajn esperantistojn eĉ en via urbo!

Ne ĉiam facilas ekhavi kontaktojn kun esperantistoj, ĉu en propra regiono, ĉu kun samaj interesoj. Momente ĉefe post longa aktivado ene de la movado kaj ĉefe per renkontiĝoj, eblas ekhavi internacian amikaron. Per Amikumu, vi povas pli facile interkonatiĝi kaj plene uzi la avantaĝojn de la interreto.

*laŭ ret-info*

## La semajnaj lingvaj seminarioj en penziono ESPERO Skokovy

okazos printempe de la 16-a ĝis la 22-a de aprilo, aŭtuna seminario okazos de la 15-a ĝis la 21-a de oktobro. Aliĝu ĉe Jindřiška Drahotová, Sadová 745, 293 01 Mladá Boleslav, telefono 326 731 845, drahotovaesperanto@seznam.cz, pli detale www.mlboleslav.cz/esperanto aŭ www.sweb.cz/espero.skokovy.

## Invito al Plasy

Esperantistoj de Pilzena klubo invitas vin al 6-a turisma renkontiĝo en urbeto Plasy (TREP), kiu okazos je la 14.-17.6.2007 en ripozloko „Máj“. La urbeto Plasy troviĝas en belega naturo, 25 km norde de Pilzeno (vidu trafikan planon). Dum ekskursoj kaj piedpromenoj vi havos denove eblecon ekkoni pluajn diversajn interesaĵojn en la regiono, kaj vespere rigardi video-projekciojn. La prezo por unu tago (3-foje manĝo kun loĝado en kelklitaj ĉambroj por anoj de ĈEA = 300,- Kč, por la ceteraj partoprenantoj = 20 eŭroj. Aliĝilojn kun adreso, naskiĝdato kaj dato de alveturo bonvolu forsendi ĝis fino de majo letere al: Václav Kaprál, poštovní schránka 11, CZ-331 51 Kaznějov aŭ rete: esperantoplzen@centrum.cz. Ĉiuj estos ĉiam bonvenaj. Ni komencas ĵaŭde 14.6. de la 14-a horo posttagmeze.

## Esperanto-filatelo denove sukcesas

Dum la tagoj 16.-20.11.2006 okazis en la belga ĉefurbo Bruselo la tutmonda filatela ekspozicio Belgica 2006, dediĉita precipe al eksponaĵoj de junaj filatelistoj, kio praktike signifis, ke samtempe temis pri Junulara Mondĉampioneco en filatelo. La ekspozicion aŭspiciis belga reĝa geedza paro. En la ekspozicia bulteno oni inter aliaj fakaj artikoloj publikigis artikolon „Mondlingvo Esperanto“ kun akompanaj malnovaj fotoj de la koncernaj filatelaĵoj (p. 113-118). Aŭtoris ĝin neesperantisto, sed eminenta kaj mondskale sukcesa kaj konata ĉeĥa filatelisto inĝ. Lumír Brendl, la nuna prezidanto de Ĉeĥa Filatela Asocio.

## Voĉdono por la PEN-Premio "La Verko de la Jaro 2006"

Ses titoloj kandidatas por la Esperanta PEN-Premio “La Verko de la Jaro 2006”, rezervita al la originala prozo eldonita en 2005-2006: “Amaro” de Sten Johansson (eld. Fonto), “Arne, la ĉefido” de Leif Nordenstorm (eld. KAVA-PECH), “Bildoj pri norda lando kaj aliaj rakontoj” de Sen Rodin (eld. FEL), “Diverskolore” de Trevor Steele (eld. Sezonoj), “La fotoalbumo” (dua volumo) de Trevor Steele (eld. IEM) kaj “Hodler en Mostar” de Spomenka Ŝtimec (eld. Edistudio). Ili ricevis la necesan subtenon de minimume tri PEN-anoj, kaj estis submetitaj al la referendumo de la abonantaro de “Literatura Foiro”. La voĉdonilo aperis en la decembra numero de revuo “Literatura Foiro”. La limdato por la voĉdono estas la 30-a de aprilo 2007. La sekretario de la premio estas Milena Makaveeva (Bulgario). Ŝi ricevos la balotilojn (poŝte kaj/aŭ rete) kaj kompilos la finan klasifikon.

*laŭ NUN*

## Genealogio

En lasta jarmilo en Eŭropo okazadis multaj migradoj kaj ni ĉiuj estas foraj kuzoj. Tion oni povas pruvi nur parte, ĉar konserviĝis nur dokumentoj el lastaj tri jarcentoj. Ni tre ĝojos, se ni povos enmeti en nian datenbankon pri la eŭropaj familioj, enskribojn de bohemiaj, moraviaj kaj sileziaj esperantistoj kaj neesperantistoj. Bonvolu viziti niajn paĝojn:

Ligiloj al genealogiaj retejoj kun esperantlingva versio
http://worsten.org/famrete/niaj_retejoj.htm
Regiona genealogia esplorado:
http://worsten.org/rge/cz/rge_cz.htm
Principoj de la datenbanko
http://worsten.org/rge/pr/principaro_cs.htm
Pri ĉiu distrikto en la Ĉeĥa Respubliko estas aparta paĝo, sur kiu ni listigos enskribojn de personoj, kiuj loĝas en tiu distrikto aŭ kies praŭloj devenas el tiu distrikto.



*La paĝo pri genealogio en Ĉeĥio*

Serĉataj estas familioj Lazar kaj Šulák:

http://retejoj.eurogento.org/lazar/gento_lazar_cs.htm

http://retejoj.worsten.org/jans/cs.htm

# La plej granda vortaro

En aprilo 2007 aperos en Hamburgo (Germanio) ***Granda Vortaro Germana-Esperanta*** [Großes Wörterbuch Deutsch -Esperanto]. Tiu vortaro enhavas pli ol 160.000 serĉvortojn kaj parolturnojn ***sur 1679 paĝoj grandformataj*** kaj do estos la plej granda Esperanto-vortaro iam aperinta en la mondo. La fama lingvoscienca eldonejo Buske-Verlag aperigis jam en 1999 (tuj antaŭ la UK en Berlino) la ampleksan *Granda Vortaro Esperanta-Germana* (882 pp.) kaj estas rete kontaktebla pere de www.buske.de (german- aŭ anglalingve). La aŭtoro de ambaŭ vortaroj estas Prof. d-ro Erich-Dieter Krause.

## LA POLA RADIO PLU AŬSKULTEBLA

Malgraŭ la januara ĉesigo de la Esperanto-elsendoj de Radio Polonia pere de mallongaj ondoj, oni daŭre povas aŭskulti ĝin pere de interreto. Nova juna redakcia teamo nun pretigas ĉiutage dudekminutan elsendon, kiun oni povas aŭskulti ĉe

http://www.polskieradio.pl/eo/ -

En la kadro Aŭskultu oni povas tuj lanĉi la lastan elsendon; sub ĝi troviĝas Arkivo de antaŭaj elsendoj. La nova sistemo ebligas precizan kalkuladon de aŭskultantoj, tial nun des pli gravas subteni la elsendojn per aŭskultado.

*ret-info*

# ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

(Oificiala organo de ĈEJ, redaktita de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) festas du jarojn ekde la momento, kiam tri studentoj unue kunvenis por restarigi la organizitan junularan e-movadon en Ĉeĥio. La civitana asocio nun havas 71 membrojn kaj ĝia plej granda ĝisnuna atingo estas la internacia trejnseminario okazinta en Brno, pri kiu oni nun povas legi resumon en la retpaĝaro de ĈEJ.

Jarŝanĝe 5 ĈEJ-anoj ĉeestis renkontiĝon Ago-Semajno en Pollando. En la skipo estis pluraj novuloj kaj iliajn entuziasmajn raportojn vi povas legi en la retpaĝaro. Samloke spekteblas ankaŭ nemalhavinda filmo pri la aranĝo. Aldone, la 6-an de januaro Marek Blahuš reprezentis Ĉeĥion dum esperantista supreniro sur la monton Poludnica en slovakiaj Tatroj.

Post sukcesa disvendo de 100 ekzempleroj de la DVD "Esperanto Elektronike" dum 4 monatoj, ĈEJ nun disponas per novaj 100 ekzempleroj de la dua, plibonigita eldono, kaj ofertas ĝin al aĉetemuloj. En Pasporta Servo 2007, mendebla ĉe ĈEJ, aperis du novaj junaj gastigantoj (Dagmar Chvátalová kaj Petr Dohnálek). Jan Urbánek kaj Marek Blahuš instruos dum la lasta februara semajnfino en seminario de SKEJ pri Vikipedio en Partizánske (Slovakio). Aktualaĵoj pri ĉeĥa junularo ĉiam troveblas en ĝia retpaĝaro ĉe http://www.esperanto.cz/cej

# PASPORTA SERVO 2007 MENDEBLAS

Pasporta Servo (PS) plifaciligas internacian vojaĝadon kaj trovadon de interkulturaj kontaktoj, ebligante al siaj membroj resti en la hejmoj de aliaj esperantistoj. Ĉiujare oni kompilas liston de gastigantoj, kiuj pretas senpage akcepti gastojn por tranoktado. La nun aperanta eldono por 2007 enhavas 1294 adresojn en 89 landoj. Necesas scipovi Esperanton por uzi la servon. Ĉeĥa Esperanto-Junularo organizas grupan mendon de PS 2007. Unu ekzemplero kostos ĉ. 450 Kč. Tamen por certigi ĝin necesas mendi rapide, ene de kelkaj tagoj. Interesiĝantoj skribu al ĉej@blahus.cz

# Ago-Semajno 2006

okazis inter la 26-a de decembro 2006 kaj la 2-a de januaro 2007 en urbo **Nowy Sącz** en Malgrandpolio, Pollando, proksime de Zakopane kaj Krakovo. Ĉeestis ĝin ĉirkaŭ 180 gejunuloj el pluraj landoj de Eŭropo, Ameriko kaj Azio. Inter ili estis ankaŭ grupo de kvin ĉeĥoj, membroj de Ĉeĥa Esperanto-Junularo - en la grupo gvidata de **Marek** alvenis **Mirek**, **Franta** kaj **Karol**. Por tiuj tri ĝi estis la unua internacia E-renkontiĝo eksterlande, aŭ, kaze de Karol, eĉ unua E-renkontiĝo entute (li komencis lerni Esperanton nur en la trajno!). En la agosemajno partoprenis ankoraŭ ĉeĥino **Markéta**, kiu nun loĝas kaj laboras en Pollando.

# Esperantistoj el Okříšky denove sukcesaj

Sub ĉi tiu titolo informas Informilo de Okříšky 5/2006, ke la infanoj el la loka Esperanto-rondeto akiris premiojn en desegno-konkurso de la franca urbo Lunay-Vendomois pri la temo „Akvo - tero - fajro - aero“. La unuan premion gajnis Oldřich Hobza (infanĝardeno) kaj la trian premion Barbora Vostalová (8-a klaso). Pri la sukceso informas ankaŭ la civita retejo

**http://www.okrisky.cz/vismo/dokumenty2.asp?u=10977&id_org=10977&id=207356**.



La diplomojn transdonis direktorino de la infanĝardeno Jana Zelená kaj vicdirektorino de la elementa lernejo Mgr. Helena Štajglová. Salutis kaj kantis amikoj el la Esperanto-rondeto, gvidata de d-ino Kamila Bártlová. La laste menciitan intervjuis Horácké noviny (26. 1. 2007) kaj dediĉis al Esperanto tutan paĝon. Okříšky havas nun sian oficialan retpaĝaron ankaŭ en Esperanto.




# Lančov 2007

55. jazykový tábor se uskuteční opět ve třech etapách:

1. běh 1.7.-14.7.2007 E, A, N
2. běh 15.7.-28.7.2007 E, A, Š, N, R
3. běh 29.7.- 11.8.2007 E, A, N

Kromě esperanta se vyučuje také angličtina, němčina, španělština a ruština. Stravování je 5x denně, ubytování ve čtyřlůžkových chatkách. Záchody a umývárny byly rekonstruovány.

Kurzovné na esperanto je 2500 Kč (děti) a 2700 Kč (nad 15 let), u ostatních jazyků 3000 Kč (děti) a 3200 Kč (starší). Zahraniční účastníci platí 125 EUR. V ceně je stravování, ubytování i kurz. Slevu 200 Kč mají členové Klubu mládeže LET Lančov, další slevu 200 Kč získáte při zaplacení do 30. 4. 2007 nebo 100 Kč do 31. 5. 2007. Informace na www.set-lancov.cz, podhradska@volny.cz (tel. 543 233 047) nebo na adrese Esperanto, 674 01 Třebíč.



Na závěr třetího běhu se uskuteční tradiční setkání bývalých táborníků se slavnostním nástupem u příležitosti jubilejního 55. tábora a seminář *Jak pracovat pro esperanto v současnosti* (viz str. 23).

## Seminář: Jak pracovat pro esperanto v současnosti?

Dnešní svět počítačů, internetu, mobilů, videí a výukových programů poskytuje naší práci nové možnosti, jiné zase vzal. Můžeme realizovat projekty, na které se minulé generace esperantistů neodvažovaly ani pomyslet, zato se vytratilo dřívější idealistické nadšení. Často si sami neuvědomujeme, co všechno dnes můžeme uskutečnit, ale ani to, jak se změnilo myšlení a postoje "vnějšího" světa, na který se snažíme zapůsobit.

Poslední týden třetí etapy letošního Lančova před tradičním setkáním bývalých táborníků chceme věnovat semináři na toto téma ve dnech **5. až 11. srpna 2007**. Pět dní po čtyřech hodinách diskusí, převážně v češtině, proberou důkladně témata, kterých se naše svazové konference dotýkají jen letmo.

Komu leží na srdci osud esperanta, našeho svazu, našich klubů a jejich knihoven, měl by se semináře zúčastnit. Víme, že další generace esperantistů už nebudou pracovat stejným stylem jako my (klubové schůzky, nástěnky, knihovničky, věstníky) a musíme se důkladně zamyslet, jak v roce 120 výročí esperanta uchovat stoleté kulturní dědictví, tedy dosavadní práci, do budoucnosti a zajistit její pokračování. Pokud neučiníme včas patřičné kroky, může naše kultura v dalších desetiletích skončit ve sběrných surovinách. Dnešní studenti nejsou zvyklí lámat si hlavu osudem literatury studovaného jazyka.

Týdenní pobyt vyjde na poloviční cenu za etapu, tedy na 1400 Kč.

Témata:

1) Vytvoření obrazu esperantské kultury jako části světa, do které vstoupit se vyplatí, protože nabízí zajímavé možnosti využití jazykových znalostí

2) Vytvoření systému učebních a pracovních nástrojů, aby zájemce mohl zvládnout a používat esperanto na žádoucí úrovni k zamýšlenému účelu

3) Vedení klubových knihoven tak, aby v rámci svazu vytvořily určitý systém esperantské kultury (esperantologie a interlingvistiky) vzájemně se doplňující, který by se dal začlenit i do celostátního systému meziknihovních služeb, případně právně zajistit proti likvidaci.

4) Náš podíl na vytváření celosvětových turistických informací v esperantu o regionech, státech, městech, památkách a národních kulturách.

5) Náš podíl na vytváření esperantských informací z oblastí kultury, sportu, vědy a techniky se zaměřením zvláště na děti, mládež, studenty, seniory, tělesně postižené a další skupiny.

Cílem semináře je uvědomit si potřebu uvedených úkolů a ujasnit si cesty k jejich realizaci. Každý den skončí doporučením, jejichž souhrn bude zveřejněn vzávěrečné rezoluci. Účastníci se pokusí zformulovat doporučení nejdříve jako jednotlivci (aby si každý uvědomil, co mu seminář přinesl), nakonec pak jako skupina. Dostanou také úkol (vyberou si z několika možností), který se pokusí během týdne zpracovat.

Informace a přihlášky:
Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10,
625 00 Brno,
**malovec@volny.cz**

## PRI ESPERANTO INFORMI PUBLIKON KONVENAS EN TIES NACIA LINGVO

Kiam mi antaŭ du jaroj ricevis donace la libron *Homo, kiu defiis Babelon*, tuj mi decidis alvicigi ĉeĥan tradukon al la hispana, korea, litova lingvoj (kaj eble aliaj). La vivon de nia Majstro priskribis francaj verkistoj: René Centassi kaj Henri Masson. Antaŭparolon verkis Louis Christophe Zaleski-Zamenhof. La libro enhavas eldirojn de diversaj famuloj, ekz. Claude Piron, Romain Rolland, Jean Rostand, Willy Brandt – kaj Umberto Eco, aŭtoro traktinta diversajn aktualajn temojn, kiu la libron rekomendas al siaj studentoj.

Tio estis „la defio“ por mi.

Kia estas la stato de la traduko ĉi momente:

La aŭtorajn rajtojn aranĝis por mi Henri Masson mem rekte de la eldonejo L´Harmattan. La lingvo-korekto estas en procedo. Neniu obstaklo staras kontraŭ la preso de la 280-paĝa libro, kaj mi esperas, ke ĝi ĝustatempe aperos kiel omaĝo de du gravaj ĉi-jaraj jubileoj: 120 jaroj de la apero de la UNUA LIBRO en 1887 el la plumo de L. L. Zamenhof, kaj 90 jaroj, de kiam la Majstro forpasis.

Karaj gesamideanoj, por ke la menciita „rememorigilo“ ne restu en stoko de mia loĝejo, mi bezonas vian helpon! Mi instigas vin ĉiujn jam nun cerbumi kaj pripensi, al kiuj „konvena personoj“, al kiuj institucioj kaj institutoj en la neesperantista medio, vi distribuos ĝin. Por prezenti la homon – HOMON – L. L. Zamenhof, kiu tiom faris por la homaro. Certe li tiun agon pli aprezus, ol ĉiujn eventualajn rememor-ceremoniojn. La libro estos sendube efektiva maniero festi la „Eŭropan tagon de gepatraj lingvoj“ – ĉar Esperanto kiel samvalora partnero de naciaj lingvoj jam ekzistas en iuj landoj.

Mi dankas al miaj kunlaborantoj, kun espero je via subteno kaj helpo karaj gelegantoj

via

Jindřiška Drahotová
Sadová 745/36
CZ-293 01 Mladá Boleslav
tel.: +420/326/731845
mail: drahotovaesperanto@seznam.cz
www: www.mlboleslav.cz/esperanto

En bonaj ĉeĥaj librovendejoj vi povas aĉeti tradukon de la libro *Ili vivis sur la Tero* de geedzoj Robineau kun titolo: *Osm let na cestách po naší planetě* el la eldonejo Volvox Globator.

Ĉe mia adreso vi povas peti *Legolibretojn* II, III, IV.

## Ordeno de Verda Plumo

je publikace chorvatského autora Josipa Pleadina představující na 450 esperantských spisovatelů, mezi kterými jsou i naši:

*J. Bělohlav, S. Bubeníček, J. Cíchová, T. Čejka, J. Filip, O. Ginz, R. Hromada, E. Jelínková, S. Kamarýt, J. Karen, T. Kilian, O. Kníchal, J. Kořínek, K. Kraft, F. V. Lorenc, M. Lukáš, J. Mařík, F. Omelka, K. Píč, T. Pumpr, L. Riedl, J. Rumler, S. Schulhof, E. Seemannová, J. Šupichová, Š. Urban, E. Urbanová, V. Váňa, Č. Vidman, V. Vinař, J. Vondroušek, J. Werner.*

Cena UEA: 33 eur.

## Silvestr 2006 v České Třebové

Jako každoročně i letos esperantský klub „Amikeco“ Česká Třebová pořádal dne 29. prosince esperantského silvestra v klubu Horbytka. Sjelo se 63 účastníků z 19 míst naší republiky. Nejvzdálenější účastníci byli např. z Ústí nad Labem, Prahy či Mikulova. Pořadatelé kromě pohoštění připravili soutěže a kvízy. Celý večer moderovala Jana Křížková. Porota vybírala nejlepší scénku na téma „Naše vesnice“. Vyhrálo družstvo České Třebové se scénkou „Když jsem já sloužil“. Vítězkou kvízu ze znalosti lidových názvů se stala členka svitavského klubu Marie Minářová. Jako nejpilnější tanečník byl vyhodnocen Jirka Kosnar z Pardubic. Pořadatelé také popřáli jubilantovi Kvido Janíkovi ze Šumperka, který v lednu oslaví 60. narozeniny. Jako vždy se rozdávaly i vánoční dárky. O půlnoci se před přípitkem zpívala společně česky i v esperantu píseň na uvítání nového roku. Zástupci kroužků informovali o svých akcích v roce 2007. Esperantský klub Litomyšl bude pořádat v měsíci březnu výstavu v Městské knihovně a pro návštěvníky besedu o esperantu. Předsedkyně AEH Pardubice Jarmila Rýznarová vyprávěla o své spolupráci s rozhlasovou stanicí v Uruguay. Tato stanice vysílá do celého světa esperantské relace, kde Jarmila Rýznarová již několikrát posluchačům vyprávěla o českém esperantském hnutí a mimo jiné o konání esperantského silvestra v České Třebové. Svitavský Klub přátel esperanta bude pořádat dětský esperantský den, kterého se tentokrát zúčastní i mladí esperantisté z Polska. Místní esperantisté všechny pozvali na letní esperantský ples. Všichni se dobře bavili a s chutí si zatančili.

## Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto

peras korespondadon inter japanaj kaj eksterlandaj korespond-dezirantoj. Se vi interesiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio, Japanio. Bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi laboron de la servo.

## Ĉebalta Esperantista Printempo

Pola Esperanto-Asocio Filio en Koszalin tre afable sciigas vin, ke en la tagoj 12.-20. de junio 2007 okazos en Mielno la 29-a Ĉebalta Esperantista Printempo kun riĉa kaj varia Esperanto-programo. Vidu www.esperanto.koszalin.pl

### Esperanto ekster Esperantujo

Estas mirige, ke en Usono, Japanio, Germanio kaj en kelkaj aliaj landoj artistoj kaj bandoj elektas la nomon “Esperanto” kiel titolon de siaj albumoj, aŭ kiel nomon de la bando mem, kvankam ili ne estas esperantistoj. Ĉu temas pri modo? Ekzemple, antaŭnelonge fondiĝis The Esperantos - roka triopo el Bay City en Miĉigano (Usono). Vidu informon en la rubriko „novaĵoj“: http://www.esperanto.org/Ondo/

*Aleksander Korĵenkov*

# La lasta IKF

La 18-a Internacia Kultura Festivalo kune kun la 27-a Ĉeĥa-Saksa Tago okazis en urbo Ústí nad Labem, Ĉeĥio, dum la 8-a ĝis la 10-a de decembro 2006. Ĝi estis dediĉita al la centa datreveno de naskiĝo de elstaraj ĉeĥaj literaturistoj Jiří Kořínek kaj D-ro Tomáš Pumpr.

Vendrede estis bonvenigitaj la aliĝintoj (venintaj ne nur el diversaj lokoj de Ĉeĥio, sed ankaŭ el la najbara Germanio) kaj prezentitaj raportoj pri E-agado en la reprezentitaj E-kluboj kun ioma komuna kantado, prezentado de E-sorĉisto kaj amika babilado.

La ĉefa programo okazis sabate la 9-an de decembro. En la prelega matineo eksonis prelegoj pri ambaŭ jubileuloj. Pri Jiří Kořínek (1906-1988) parolis Prof. D-ro Vlastimil Novobilský, CSc. menciante lian tradukan kaj originalan kreadojn. Al la kvindeko da aŭskultantoj li prezentis unuhoran sonbendan intervjuon kun J. Kořínek, kies enhavo ne nur reliefigis la tutvivan laboron de la poeto sur la literatura kampo, sed enhavis ankaŭ interesajn aktualajn konsiderojn pri la stato de la E-movado antaŭ pli ol dudek jaroj kaj ankaŭ profetajn vortojn koncerne estontan vojon de nia lingvo.

Sekvis prelego pri D-ro Tomáš Pumpr (1906-1972) en prezento de Jiří Patera el Prago, kompletigita de Miroslav Malovec el Brno (pri tradukado de Bapto). Ili ambaŭ aprezis elstaran rolon de Pumpr, kiu per siaj tradukoj disvastigis konon pri la ĉeĥa literaturo tra la E-mondo. Kelkaj liaj Esperanto-tradukoj fariĝis plie lingvaj pontoj, pere de kiuj estiĝis tradukoj ĉinaj, japanaj k.a.

Sabata posttagmezo estis dediĉita unue al la spirita koncerto en la loka preĝejo de Sankta Paŭlo. La ĉefa kultura programo okazis sabate vespere en la neordinare bela salono de la urba muziklernejo de Eva Randová. La artisman programon kompilis Miroslav Smyčka kaj realigis ĝin en Esperanto plejparte profesiaj kantistoj kaj muzikistoj el Prago, Brno, Olomouc kaj Ústí nad Labem. Oni aŭskultis ekz. ariojn el „La najado“ de Dvořák, „La edziĝo de Figaro“ de Mozart, „Rigoletto“ de Verdi k.a. Prezentitaj estis ankaŭ arioj el operetoj, plie instrument-koncertoj kaj poem-deklamado.

La aktoroj rikoltis meritita aplaŭdon de la entuziasmaj spektantoj. La programo estis tiel ŝtopita, ke mankis tempo por la tradicia kolektiva kantado de kristnaskaj kantoj en traduko de J. Kořínek.

Dimanĉe la 10-an de decembro unu grupo ekskursis al monteto Ostrý, kiun poezie prikantis J. Kořínek. De ĝia pinto oni povis spekti la urbon kaj majestan fluon de la rivero Elbo fluanta al Norda maro. La alia parto de la partoprenintoj veturis trajne al la banurbo Teplice, trarigardis ĝian centron kun famaj kuracdomoj, kie iam ripozis aŭ kuracis sin ekz. J.W. Goethe, A. von Humboldt, L.van Beethoven, F. Palacký, J. Neruda kaj multaj aliaj. Ili vizitis ankaŭ gimnazion, kiun prezentis 14-jara gimnaziano, same kiel Beŭronan kapelon, pri kies renovigo mirinde aktive zorgas la lokaj gimnazi-studentoj.

## Jubileo de Ludmila Klegová

Depost naskiĝo de la iama membrino kaj kunfondantino de la klubo Poruba Ludmila (Lýdie) Klegová en oktobro 2006 pasis 80 jaroj. Juna ŝi esperantistiĝis kaj dum jaroj estis aktiva kaj fervora en esperantista agado. Ŝi kunfondis grupon „Junularo Ostrava“, instruis Esperanton en Ostrava-Stará Bělá, laboris en sekretariejo de ĈEA en Praha, kaj ĝis 2005 estis prezidantino de E-klubo en Poruba. En tiu jaro ŝi esperantigis informilon pri Ostrava. De post transloĝiĝo al Místek ŝi restas honora prezidantino de la klubo en Poruba. La klubanoj el Ostrava kaj esperantistoj, kiuj ŝin konas, deziras al ŝi ĉion bonan, sanon kaj multe da sunaj tagoj kaj esprimas sincerajn dankojn pro ŝia riĉa kaj oferema laboro por Esperanto.

*Milan Neuvirt*

## Linhart Rýznar 85-jara

Honora membro de ĈEA, populara amatora magiisto kaj sukcesa Ĉe-metoda instruisto festis la 5-an de novembro 2006 sian jubilean nask-iĝtagon. Li esperantistiĝis jam en 1937 en Liberec, post la milito li transloĝiĝis al Svitavy, kie li iniciatis fondon de la loka E-klubo kaj la samon en la najbara Polička. Post fondo de ĈEA en 1969 li laboris kiel komitatano kaj membro de la revizia kontrolgrupo.

# Jubileo de Eli Urbanová

Honora membrino de UEA kaj ĈEA, eksa akademianino kaj ĉiam aktiva poetino festis sian vivjubileon la 8-an de februaro. Sian vivon ŝi priskribis en aŭtobiografia romano **Hetajro dancas**, honorita per OSIEK-premio, sed firman lokon en la Esperanta literaturo ŝi akiris per siaj poemaroj **Nur tri kolorojn, El subaj fontoj, Verso kaj larmo, Vino, viroj kaj kanto, Peza vino, Rapide pasis la temp'** kaj **El mia buduaro**. Sian unuan poemaron ŝi publikigis ĉeĥe en 1940 ankoraŭ kiel 18-jara knabino Eliška Vrzáková en sia naskiĝ-urbo Čáslav sub la pseŭdonimo Eliška Doubravská.



# Niaj jubileantoj

La 31-an de oktobro kunvenis en salonego de la kulturdomo Vltavská en Prago tri jubileantoj: La poeto **Čestmír Vidman** ĝisvivis sian 85-an naskiĝjaron. Inter la gratulantoj estis ankaŭ **Marie Zýková** el Pilzeno, kiu solenas la saman tagon (sed ne la saman jaron!!). Kaj la tria jubilanto estis – K.H.B. – **Karel Havlíček Borovský.** Jes, la granda ĵurnalisto, poeto kaj patrioto ĝuste en la sama tago naskiĝis: je la 31-a de oktobro 1821...Nia jubilanto Č.V. al lia omaĝo elkreis malgrandan volumeton de poemoj. En ĝi li esprimas sian tutvivan admiron kaj estimon al K.H.B., kaj siajn tute intimajn sentojn li esprimis en la poemo, en kiu li parolas

**Al si mem**

Ke strange povas datoj harmonii
evidentigas dokument´
Do vi povis en lulilo krii
post Havlíček jarojn cent

Granda honoro kaj omaĝo
komenci vivon kun mesaĝo
de ribelema ĵurnalist´...

En la esperantigo de Jaroslav Krolupper ni povas legi ankoraŭ kelkajn poemojn. Sed en la ĉeĥa originalo ili estis preskaŭ ĉiuj deklamitaj de **Gabriela Vránová** kaj **Alfred Strejček.** Tiuj famaj deklamistoj tiamaniere omaĝis la jubilanton same kiel la plena salono de spektantoj, inter kiuj estis multaj esperantistoj. Ĉu ne esti kortuŝitaj (kaj fieraj), kiam A. Strejček alparolis la aŭtoron: *Kara amiko, sciu, ke iu delonge nin kunligas: ĝi estis Eva Seemannová, via amikino, por kiu vi estis dramaturgo kaj kiu ankaŭ pro viaj verkoj faris tiun ĉi salonon plena same kiel hodiaŭ; sciu, ke ŝi ankaŭ al mi instruis Esperanton (kiun mi dumtempe forgesis), kaj ke sub ŝia gvido mi eĉ kantis kaj deklamis esperante...* Ne nur ŝia filo Štěpán Sucharda, sed ni ĉiuj sentis sinceran dankon al E.S., kiu semis bone, en fekundajn korojn de siaj aŭskultantoj, kiuj samtempe estis ĉi tagaj partoprenantoj.

Restas aldoni, ke ĝuste en la koncerna tago aperis la „novbakita“ libro de Čestmír Vidman, kiu portas la nomon **Než padne mlha docela** (Antaŭ ol la nebulo falos plene). La titolo memorigas tristan realecon, ke la vidkapablo de la aŭtoro estas preskaŭ tute nebuligita, sed samtempe la legantoj trovas en la libro lian optimismon kaj sinceran „esperantistecon“ , kiun li proklamas ne nur surpapere. Ankaŭ li semas bonan semon kaj tial ni danku lin kaj gratulu al li!!

*Rememore al Eva Seemannová, al ŝia morto-tago – la 21-an de januaro 1999.*

# Ni havis reĝinon...

la „reĝinon de scenejo“, kiu per sia arto vivigis (krom aliaj) la tri reĝinojn de ĉeĥa historio, nome: Kunhuta, Alžběta Rejčka, Eliška Přemyslovna.

En la dramaturgio de Čestmír Vidman (kaj sia propra) ŝi ludis ties rolojn sur multaj podioj; ĉeĥlingve. Sed tiun lastan – nome Eliza Premislida – ŝi opiniis tiel elstara (ŝi ja estis patrino de la reĝo Karolo la Kvara), ke ŝi revis prezenti ŝin antaŭ la publiko kiel eble plej vasta –

kaj internacia.

Tiun revon ŝi efektivigis: dum la 81-a Universala Kongreso, Prago, 1996. Sen modifo ni legu la recenzon de la plej elstara spektanto, jen...

Pri Eva Seemannová mi plurfoje aŭdis: Honora Membro de Ĉeĥa E-Asocio kaj nun ankaŭ de UEA, de jardekoj teatre aktiva – ŝi faris tro multe por listigi tion.

*Do kun grandaj atendoj mi iris spekti ŝin en* ***Mi, Eliza Premislida, reĝino ĉeĥa,*** *dramigo de novelo pri la lasta ĉeĥa reĝino de la Premislida dinastio (1292 – 1330), historio al mi – kaj supozeble al multaj – absolute nekonata. Unuavide stranga elekto: kial mi estu emocie trafita de intrigoj de homoj el foraj tempoj, kies nurajn nomojn estis malfacile kapti kaj memori? Tamen Eva Seemannová ludis tiel konvinke ke mi plene forgesis kie mi estas. Mi vidis, vere* ***vidis*** *junan virinon kiu baraktas por sia dinastio, por sia infano, kiu estos la savanto de sia popolo. La aktorinon kiu jam aktivis en la 50-aj jaroj mi tute ne plu vidis. La historiajn detalojn mi plejparte forgesis – sed ŝiajn klopodojn kaj ŝiajn suferojn mi ne tiel rapide forgesos.*

(Gerrit Berveling, Nederlando. Transprenite el: ESPERANTO 1084 (9), septembro 1996.

## Postsekve al Eva Seemannová Rememoro en la tago de ŝia morto 21.1.1999

Ŝi vojiris laŭ rivero
de aŭtuno ĝis somero
kaj rulŝtonojn ŝi kolektis
Ŝi kumulis ilin hejme en kartono
malantaŭe sur balkono
Ili ĉiam ŝin delektis

Je Kristnasko ŝi preparis
al la ŝtonoj ja omaĝon
Reanimon ŝi finfaris
Jen sur ĉiu ŝtono pentris ŝi vizaĝon
de koloroj buntaj

Ermiton ien gvidas sbiro
Princoj kaj knabinoj floraj
Princinoj kun kronetoj oraj
Ankaŭ ruzaj klaĉulinoj
Kaj kampuloj Kampulinoj
Kolosoj Nanoj Elfoj Gnomoj
Feoj kaj fantomoj

Ridemulo Blanka dentorondo
ridetanta al la tuta mondo
Akompanas Sanĉo Donkiĥoton
Kolombino trompas Pieroton
Kaj tubisto kun volvitaj ŝnuroj
Panoptiko Multe da figuroj

Al la kreintino venis la ideo
teatraĵon ludi kiel sur arkeo
Laŭ riveroj ŝi promenis
kun rulŝtonoj arlekenis
Ŝi la mondon ja komprenis

*Čestmír Vidman*
*esperantigis Jaroslav Krolupper*

# Novaj libroj de Jiří Karen

Estis trovita manuskripto de poemaro **Revuloj** el 1980, kies samnoma poemo en la sama jaro ricevis la 2-an premion de Belartaj Konkursoj de UEA. En 2006 estis eldonitaj du ĉeĥlingvaj libroj de korespondaĵoj de Jiří Karen el militaj jaroj, kiam li estis laborigita en Germanio: **Dopisy z Rajchu** (Leteroj el Reich) kaj **Kdybych se snad nevrátil...** (Se mi eble ne revenus ...). Ni ekscias, ke liaj gepatroj baldaŭ mortis kaj tial li estis edukita de la geonkloj, ke li korespondis kun gravaj verkistoj Jiří Šotola, Zdenek Rotrekl, Jan Zahradníček kaj kun sia unua amo, poetino Věra Lhotská.

# KALENDARO 2007

■ ***2007-03-19/31: Esperanto-ekspozicio** en la urba biblioteko (iama urbodomo) en Litomyšl. En ĝia kadro okazos "Prelego pri Esperanto kun sekva diskuto" marde 2007-03-20 je 17:00. Inf.: flidr.josef@lit.cz*

■ ***2007-04-13/15: Adonido** (Hlaváček jarní) en Ratíškovice. Renkontiĝo de amantoj de naturo kaj bongusta vino. Inf.: melicharkova@quick.cz*

■ ***2007-04-13/15: Laborseminario en Písek** dediĉita al a) kreado de retpaĝoj de E-kluboj, b) tradukado de jam ekzistantaj retpaĝoj de urboj kaj aliaj memorindaĵoj en Esperanton kaj strategio de ilia enretigo. Bonvenas kaj spertuloj pri komputiloj kaj E-tradukado, kaj ĉiuj seriozaj laikoj!*

■ ***2007-04-14: Sabla Printempo en Písek,** turisma, kultura kaj kleriga programo, paralele kun supre menciita laborseminario. Inf. por ambaŭ eventoj: pavladvorakova@tiscali.cz*

■ ***16.-22.4.2007 Semajna lingva seminario en pensiono Espero en Skokovy.** Aliĝu ĉe Jindřiška Drahotová, Sadová 745, 293 01 Mladá Boleslav, telefono 326 731 845, reta adreso: drahotovaesperanto@seznam.cz, www.mlboleslav.cz/esperanto www.sweb.cz/espero.skokovy*

■ ***2007-05-04/06** (kun ev. plilongigo ĝis 08): **Maja renkontiĝo de Katolika sekcio** de ĈEA en komforte ekipita pilgrimdomo en Dub nad Moravou. Inf.: m.svacek@seznam.cz*

■ ***2007-05-26: Renkontiĝo de ekstendaranoj de iamaj tendaroj en Herbortice**. Inf.: m.svacek@seznam.cz*

■ ***30.5.-3.6.2007: La 5-a kongreso de Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj**. Seč (30 km sude de Pardubice). Informoj: aeh-ikeh@volny.cz*

■ ***2007-06-09: Infana Esperanto-Tago en Svitavy**, ekskurso al la Afrikaj trofeoj kun konkurso (kune kun polaj infanoj), inf.: dvorakovalibuse@quick.cz*

■ ***2007-06-14/17: La 6-a Turisma Renkontiĝo en Plasy** proksime de Plzeň (TREP). Inf.: esperantoplzen@centrum.cz*

■ ***2007-06-16: Somera Esperanto-balo** en Česká Třebová. Inf.: zn.esperanto@seznam.cz*

■ ***2007-06-17: Ĉeĥa-pola-slovaka Esperanto-renkontiĝo** sur la pinto de la lim-monto Ĉantoria. Inf.: suchanekj@seznam.cz*

■ ***30.6.-6.7.2007: Ekoturisma renkontiĝo por pied-turistoj kaj biciklantoj.** Radošov apud Karlovy Vary, Informoj: chrdle@kava-pech.cz*

■ ***1.7.-28.7.2007 Du etapoj de SET Lančov***

■ ***2007-07-29/08-11 - La 3-a etapo de Lančov (Esperanto, angla, germana). En la dua semajno de la tria etapo okazos seminario pri laboro por Esperanto en la nuntempaj kondiĉoj kaj fine de la tria etapo la ekstendaranoj kaj amikoj de la tendaro festos la 55-an jubilean tendaron. Ĝustatempa aliĝo donas rabatojn. Pli da informoj kaj aliĝiloj ĉe http://www.set-lancov.cz/ aŭ ĉe podhradska@volny.cz***

■ ***29.7-14.8.2007: Komuna flugo al la 92-a Universala Kongreso al Jokohamo** (Japanio). Informoj: chrdle@kava-pech.cz*

■ ***2007-07-21/28: Atentu: la komuna busvojaĝo el Olomouc al la 18-a Ekumena Kongreso** (60-a IKUE, 57-a KELI) kune kun la 8-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro. Pelplin (PL), pri kiu ni informis pasintnumere NE OKAZOS pro malgranda nombro de aliĝintoj. Oni veturos komune, sed trajne. Inf.: m.svacek@seznam.cz*

■ ***12.-16.9.2007: Konferenco de IKEK** (Internacia Kolektivo de Esperantistoj-Komunistoj), Dobřichovice, inf.: dieter.rooke@tiscali.ch*

■ ***21.-23.9.2007 Konferenco de ĈEA (Polička)** Inf.: podhradska@volny.cz*

■ ***24-30.9.2007: Internacia Paroliga Semajno (InPaSem)**, kurso de Esperanto por komencintoj kaj lingva seminario por jamaj parolantoj, Dobřichovice. Informoj: chrdle@kava-pech.cz*

■ ***7.10.2007 Renkontiĝo en Svitavy***

■ ***15.-21.10.2007 Semajna lingva seminario en pensiono Espero en Skokovy.** Aliĝu ĉe Jindřiška Drahotová, Sadová 745, 293 01 Mladá Boleslav, telefono 326 731 845, reta adreso:* ***drahotovaesperanto@seznam.cz, www.mlboleslav.cz/esperanto www.sweb.cz/espero.skokovy***

*Kaj jam notu por la jaro 2008: **2008-11-07/09: KAEST 2008** (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en Dobřichovice. Inf.: chrdle@kava-pech.cz*

# Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu:** 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete V. Hiršovi seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřižek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):
**06940** členství ČES
**06941** členství UEA
**06942** předplatné Starta bez členství
**06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
**50200** sekce železničářů IFEF
**50400** komise pedagogická ILEI
**50401** písemný kurs začátečníci
**50402** písemný kurs pokročilí
**50404** Paroliga kurso
**50405** svazové zkoušky
**50800** sekce nevidomých LIBE
**50900** sekce zdravotníků UMEA
**51000** sekce křesť. esp. KELI, b. ú. u Poštovní spořitelny č. 211 768 239/0300
**51100** sekce katol. esp. IKUE
**51200** sekce informatiky
**70100** komise pro tisk a inf.
**80200** ediční fond
**80300** propagace v tisku
**80400** fond Tilio

## Upozornění pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

# Zájemci o časopisy

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz. Předplatné uhraďte na účet u České spořitelny v Poděbradech, č.ú. 0017 011 013/0800, konst. s. 0379 a variabilní s. uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato:** 890,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4
**La Gazeto:** 650,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5
**La Ondo de Esperanto:** 540,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4
**Juna Amiko:** 300,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5
**Literatura Foiro:** 1000,- Kč, v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5
**Heroldo de Esperanto:** 1080,- Kč, v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3
**Femina:** 660,- Kč, v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A 4
**Litova Stelo:** 300,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5
**Pola esperantisto:** 360,- Kč, v.s. 07009, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

**Periodikum Českého esperantského svazu (38. ročník)**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**malovec@volny.cz;
http://members.chello.cz/malovec/**

**Členská evidence a změny adres:**

**c/o Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 385 367, hirs@gm.vyskov.cz**

**Uzávěrka dalšího čísla**: 7.5.2007

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (38-a jarkolekto)**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, e-mail: malovec@volny.cz;**

**http://members.chello.cz/malovec/**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero**: 7.5.2007

**ISSN 1212-009X**

## Forpasis granda kuracisto

D-ro Yamazoe Saburoo, honora membro de UEA, aŭtoro de Angla-Esperanta Medicina Terminaro kaj Esperanta-Angla Medicina Terminaro, forpasis la 15-an de januaro 2007 en la aĝo de 98 jaroj.

**Hledáme:** Časopis českých esperantistů (Bohema Revuo Esperantista) 1907-1914, Český Esperantista (Bohema Esperantisto) 1902-1911 - **i jednotlivá čísla** - nabídněte redakci Starta.